

La Progreso

REDACTIE-
COMMISSIE:
G. P. DE BRUIN
TH. BUIJS
G. J. DEGENKAMP

**STUDIEBLAD VAN DE FEDERATIE
VAN ARBEIDERS-ESPERANTISTEN**
IN HET GEBIED VAN DE NEDERLANDSE TAAL

F. FAULHABER
W. F. KRUIT
J. A. C. LEM JR.
H. VAN LIER
H. VELTHOVE

REDACTIE-ADRES: G. J. DEGENKAMP, RIETSTRAAT 40, UTRECHT

Malsana kuracisto.

En agrabla memoro ni konservas ankoraŭ la simpatiajn vortojn de prof. Cart, per kiuj li, la tiama prezidanto de L.K., turnis sin ofte al la esperantistaro, admonante ĝin discipline obei la Fundamenton. Eĉ tiuj, kiuj ne en ĉio samopiniis kun li, tamen ne povis ne respekti la alvokojn de Cart, ĉar Cart havis vastan komprenon por aliies opinioj. Kaj plene konsciante la dignon de sia posteno en la fronto de l' esperantistaro, li agis kaj parolis kun takto. Vere, la alvokoj de tia aŭtoritatulo efikas konsile kaj kuraĝige!

Fortan kontraston kun tiaj paroloj formas la tendenco, kiu trafadas la alvokon de la nuna prezidanto de L.K., sro Isbrücker. Sub „Lingvaj Problemoj”, sro Isbr. turnas sin pere de „Heroldo de Esperanto” kaj „Esperanto Internacia” al la esperantistoj. Klariĝinte la rolon de L.K. kaj espriminte siajn personajn konceptojn pri la tasko de ĝia prezidanto, li malvolvas kelke da tiaj problemoj movantaj la animon kaj menson de multaj esperantistoj. Ni ne analizos post unu alian tiujn ĉi problemojn, sed mencias ilin nur pase, kun kelkaj komentaj vortoj, ĉar ni deziras dediĉi nian specialan atenton al la jam aludita tendenco de l' alvoko.

Kiel unuan problemon li prezentas la elparoladon de Esperanto. En sufiĉe longa pritrakto li tamen ne donas ian novan vidpunkton ĉi loke priparolindan. Strange tamen impresas, ke la aŭtoro, konstante, ke „estas pri la elparolado de la vokaloj, ke ekzistas la plej multaj duboj” (ĉu stila modelo?), prezentas pri ili teorion kaj ĉe la fino aldonas, ke ne gravas, ĉu lia teorio estas ĝusta aŭ ne! Kaj fine li venas al la konkludo, ke fakte la problemo pri la elparolado praktike jam solviĝis. Do, lia opinio ĝi jam ne estas problemo! Kial do prezenti ĝin kiel tian?!

Due li tuŝas la gravan problemon de l' vortaro. El la Esp.-gazetaro ni jam scias, ke Isbr. oficiale iniciatis ellabori tiun ĉi problemon, redaktante por la vortoj de „Universala Vortaro” klarajn difinojn, kaj petante por tio la kunlaboron de kompetentuloj. Tre merita laboro, certe! Ankaŭ la metodo estas teorie bonega, sed... ni timas, ke sro Isbr. ne vivos sufiĉe longe por finfari ĝin. Sro St. La Colla, ankaŭ membro de L.K., kalkulis en la itala gazeto „L'Esperanto”, ke laŭ tiu ĉi metodo la starigo de la difinoj de ĉiuj nunaj oficialaj vortelementoj postulus 60-70 jarojn. Sro La Colla proponas alimaniere solvi ĉi tiun problemon: preni kiel fundamenton „Plena Vortaro”, kolekti la rimarkojn de la esperantistoj kaj post ekzamenado de ricevitaj proponoj la Akademio submetu siajn decidojn al la definitiva aprobo de L.K. Sed sro Isbr., kiu kvazaŭ per unu bato

volas finsolvi ĉiujn problemojn, tamen elektis la temporaban metodon kaj toleros, ke la esperantistaro vivu ankoraŭ 60-70 jarojn en la vortara mizero! Cetere ni miras, ke ankaŭ Isbr. ne prenis P. V. kiel bazon por veni al Oficiala Vortaro. Laŭdante P. V. kaj aliajn vortarojn (de Boirac kaj Kabe) li diras, ke „al ĉiuj tiuj meritplenaj verkoj mankis verdire nur unu afero, nome la stampo de oficialeco, kiun povus doni nur la centra lingva institucio”. Nu, pli facila solvo do ne ekzistas ol simple doni al unu tia vortaro la oficialan stampon! Tio ŝparus al Isbr. kaj aliaj amason da laboro!

Pri alia problemo: la demando „ita-ata”, sro Isbr. ne volas diri multe, ĉar li... volas ŝpari siajn nervojn kontraŭ novaj atakoj! Oni certe memoras la polemikon pri tiu afero en „Heroldo de Esperanto” kaj „Bulgara Esperantisto”, en kiu kelkaj kompetentuloj miksis sin. Sed ni ne memoras, ke ankaŭ sro Isbr. ĝin partoprenis, tiom malpli, ke tio grave tuŝis liajn nervojn. Nun ni vere timas, ke la fakto, ke li prezentis aliajn lingvajn problemojn, kaŭzos al li denove fortajn nervatakojn.

„Mi ja forte aliĝis al la opinio de unu el la partioj, kaj se do la alia”, diras Isbr. Sed tia ne estas la afero! Kvankam pri la „ita-ata”-problemo sro Isbr. efektive tute pravas, li ne rajtas kondamni unu partion nur pro tio, ke li mem aliĝis al la alia! Tio ne estas la tasko de prezidanto de L.K.! Kaj ankoraŭ malpli decas al tia aŭtoritatulo minaco kia: „tiuj, kiuj jam okupis sin pri la afero, nun scias, al kiu partio mi apartenas.” Ĉu la esperantistoj povas esperi pri justa, objektiva kaj senpartia juĝo de tia partiulo? Ni povas almenaŭ iomete konsoli nin per la fakto, ke sro Isbr. verkis tiun ĉi artikolon ne oficiale kiel reprezentanto de L.K., kio ankoraŭ pli forte ol nun tuŝus la prestiĝon de nia lingva institucio. Kaj s-ro Isbr. sciu, ke al veraj esperantistoj ne plaĉas kaporalata tono!

Sed la vera tendenco de l'artikolo plej klare montriĝas el ĝia fino, kie la aŭtoro kuraĝas prezenti specialan flankon de la lingva evoluo kiel „infektan lingvan malsanon”. Temas pri la fakto, ke pluraj literaturistoj jam komprenis, ke en la uzado de „tiel” kaj „kiel” io laŭlogike ne estas en ordo, ke ekzistas grava eraro, kiun ili deziras korekti. Kvankam ili, farante tion, ne povas preni la tiokoncernan uzadon de Zamenhof kiel ekzemplon, ili tamen konformigas sian praktikon al la uzado de „iom” kaj „tiom pli, ĉar”, formoj tute zamenhofaj. La sendube serioze pripensitajn, pure logikajn formojn de aŭtoroj, inter kiuj Stellan Engholm certe estas la plej fama, sro Isbr. prezentas facilanime kiel „tiom-kiom-malsanon”! Pri tiaj aŭtoroj li diras, ke „okazis iun tagon antaŭ kelkaj jaroj, ke iu esperantisto, kiu evidente ne studis la verkojn de Zamenhof... faris eraron kaj skribis: hodiaŭ ne estas tiom varme...” Sprite li kredigas al ni, ke monaton post monato pli multaj, same malkompetentaj, esperantistoj imitis tiun uzadon, tiel ke nun granda parto de l'esperantistoj estas infektita de ĝi. Ni ne ŝatas laŭvorte ripeti la tutan babilon pri tiu afero. Ĝi naŭzas nin pro sia suspektiga tendenco. Eble ĝi taŭge konvenas en la kadro de organiza diktatoro; al L.K.-prezidanto ĝi estas malinda.

Pro tio ni nun ne volas serioze respondi al la aserto, ke „tiom” kaj „kiom” ne taŭgas — eble ni traktos tiun temon alifoje. Ni nur menciu ankoraŭ, ke sro Isbr. kvazaŭ kuracisto proponas kuraci tiun „infektan malsanon”, petante, ke ĉiu esperantisto imitu la tradician

Por Komencantoj.

H. van Lier.

Opgave 25. Vertaal in het Esperanto:

1. Het is zeer mooi zomerweer. De zon schijnt fel en de lucht is helder blauw.
2. De Bilt gaf treffend juiste berichten omtrent het weer.
3. U hebt uw les werkelijk goed geleerd.
4. De fles is bijna geheel vol. Dit tijdschrift is prachtig geïllustreerd.
5. Mijn oom heeft een schilderij, dat minstens 200 jaar oud is.
6. Onze vergadering was zeer goed bezocht. De zaal was nauwelijks groot genoeg.
7. Terwijl de man zwom, vergat hij alles om zich heen.
8. Terwijl de man zwom, stal de dief het horloge.
9. Het zal moeilijk zijn, den dief te achterhalen.
10. Nadat hij het horloge gestolen had, is hij spoorloos verdwenen.



Vertaling van opgave 17.

1. Ĉu vi deziras¹⁾ lerni bone paroli Esperanton?

¹⁾ *Volas* kan ook, maar is minder juist.

2. Tiukaze¹⁾ vi²⁾ regule vizitu³⁾ la grupvesperojn⁴⁾.

¹⁾ Of: *tiucele*. Meestal gebruikt men echter: *tiam*, wat eigenlijk op *die tijd* betekent. ²⁾ *Vi* mag niet worden weggelaten; de zin zou dan een gewoon gebod worden: *Bezoek de...* ³⁾ Hier is meer sprake van een *wens*, dan van werkelijk *moeten*; daarom dus de *u*-vorm. ⁴⁾ Of juister: *grupkunvenojn*.

3. Pri la rezultato de niaj kursoj ni povas esti tre kontentaj¹⁾.

¹⁾ *Ni* = meervoud, dus: *kontentaj*.

4. En la parko oni devas¹⁾ ne²⁾ lasi hundojn liberaj³⁾.

¹⁾ Ook: *ne rajtas*. *Mogen* kan op verschillende manieren vertaald worden, al naar gelang de betekenis ervan. ²⁾ Gebruikt men *devas*, dan moet *ne* daarachter staan. ³⁾ *Liberaj* is bepaling van gesteldheid. Men mag de honden niet los, d.w.z. in vrije staat laten. *Liberaj* geeft dus de gesteldheid weer. Niet: *liberajn*, wat zou betekenen: *de vrije honden*.

5. Ĉar¹⁾ nova skribmaŝino estis tro multekosta, ni decidis aĉeti duevendan²⁾.

¹⁾ Niet: *sed* = maar, noch: *kial* = waarom. ²⁾ Directe bepaling, dus met *n*; achter *duevandan* denke men: *skribmaŝinon*. Ook: *uzitan*.

6. Hodiaŭmatene mi estis tro malfrue¹⁾ por iri piede al la laboro²⁾.

¹⁾ Niet: *malfrua*. *Laat* geeft geen toestand van het onderwerp weer, maar vormt met *zjn* één begrip. ²⁾ Na *al* nooit richtings-*n*.

„tiel-kiel“-uzadon. Sed, asertinte, ke „tiel“ kaj „kiel“ krom maniero esprimas ankaŭ gradon, li diras, ke li „iom timas“. Se efektive „tiel“ esprimas gradon, do konsekvence ankaŭ „iel“ kaj li diru: „mi iel timas“. Kaj se tiu timo estas ne tre granda, ĉu Isbr. dirus, ke ĝi estas iom granda aŭ iel? Sufiĉu! Ni nur aldonu, ke sro Isbr. en sia artikolo kelkloke apelacias la logikon!

Kuracisto, kiam vi estos saniĝinta, nur tiam venu kun viaj medikamentoj!

7. Mi klopodos¹⁾ ellitigi²⁾ pli frue; tiam³⁾ mi estos certa povi⁴⁾ ĝustatempe foriri.

¹⁾ Niet: *peni* = inspannen, moeite doen. ²⁾ Niet: *ekstari* = gaan staan.

³⁾ Ook: *tiudkaze*. ⁴⁾ Of: *ke mi povos*.

8. Ne¹⁾ la prezidanto respondis tiujn ĉi demandojn, sed la sekretario.

¹⁾ *Ne* plaatse men niet zo maar eenvoudig voor het werkwoord; het behoort geplaatst te worden voor dat woord of dat gedeelte van de zin, hetwelk ontkend moet worden. Zo ook hier: niet *het antwoorden* wordt ontkend, want dit geschiedt door den secretaris; ontkend wordt echter, dat *de voorzitter* dat doet, dus: *ne la prezidanto*. ²⁾ Niet: *prezidinto*. Weliswaar kan de bedoelde persoon nu *prezidinto* zijn, d.w.z., dat hij de vergadering voorgezeten heeft en dat nu niet meer doet; maar op die bedoelde vergadering zelf zat hij voor, was toen dus *prezidanto*.

9. Tion diris ne mi, sed vi¹⁾!

¹⁾ Zie boven, onder 8).

10. Mi ne povis ne ridi¹⁾.

¹⁾ *Ik kon niet nalaten te of: ik kon niet anders doen dan* wordt altijd op deze manier vertaald: *mi ne povis ne*.

11. Vi devas ne¹⁾ tralegi vian korektitan laboron, sed pripensi.

¹⁾ Zie boven, onder 8).

Men vraagt ons:

Wat is uw mening omtrent hetgeen P. V. van *sen* voor een onbepaalde wijs zegt? P. V. zegt nl.: „Kvankam la uzado de *sen* antaŭ infinitivo estas neofta, ĝi estas tute korekta, ĉar logika kaj utila”.

Dit is een persoonlijke mening van den auteur, welke niemand behoeft te accepteren. Gebruikt men *sen* voor een onbep. wijs, dan is *sen* geen voorzetsel meer, maar een voegwoord geworden. En met evenveel recht zou men dan ook andere voorzetsels als zodanig kunnen gebruiken (*kun, de, per, kontraŭ, pri, post, antaŭ dum*, enz.) Waar zou dan de grens blijven? En welk practisch nut heeft het *sen* voor een onbep. wijs te gebruiken, als met *ne -ante* precies hetzelfde gezegd kan worden (*sen paroli = ne parolante*)? En bovendien: zij, die in *sen* voor een onbep. wijs een bijzondere betekenis zien, die *ne -ante* volgens hen niet zou hebben, passen analoog daaraan toch nooit *kun* voor zo'n wijs toe (*sen saluti li foriris* en *kun saluti li foriris*). Zie over dit onderwerp ook hetgeen daarvan in „Voorzetsels” gezegd is (blz. 98).

Moet analoog aan *senkulpeco, senhelpeco* enz. in plaats van *senkulpo, senhelpo*, ook niet *senkulpigeco, senarbigeco* geschreven worden in plaats van *senkulpigo, senarbigoo*?

Neen. *Eco* is hier niet nodig. *Senkulpigo* is een werking zelfstandig voorgesteld. Wilde men er een eigenschap van maken, dan: *senkulpigemo*. Weliswaar is *senkulpo* onbestaanbaar, omdat bedoeld wordt: *la eco esti sen kulpo*. Maar op dezelfde manier moet ook *senkulpigo* verklaard worden: *la ago igi sen kulpo*. Zie ook „Voorzetsels”, blz. 104.

Moet in de zin: *ĉi matene mi estis tro malfrue*, in L.P. blz. 67 niet een bijvoeglijk naamwoord (*malfrua*) gebruikt worden, analoog aan: *mi estis malsana*?

Neen; eerder zou men kunnen zeggen, dat *estis* door *venis* vervangen moest worden. *Malfrue* is geen eigenschap van *mi*; het heeft eigenlijk betrekking op de werking, die voorafging (*komen*). Men kan immers ook niet zeggen: *mi estis malfrua persono*, wat men wel kan in uw andere voorbeeld: *mi estis malsana persono*.

Provadu la memoron!

Jac. Lem.

Opgave 26. Invuloefening.

Vul de onvolledige, van een streepje voorziene, woorden in.

Historio pri l'aŭtoritato de Multatuli, tradukita de W. Nutters.

(Fino.)

1. „Vi aŭd—, kiel ŝi plend— pri la nekapablec— (geschiktheid) de siaj huf—”, respond— la leon—.
2. „Ĉu mi ne ag— prav— mangante ŝin?”
3. „Vid— mi— ungeg— (zie mijn klauwen), kiuj est— kapabl—!”
4. „Vid— la kapablec— de mi— dent—”.
5. „Pro ti— mi mang— la kaprin—”.
6. La junul— pripens— kaj rigard— si— brak—, kiuj estas long—, fort— kaj fortik—.
7. Li trov— il— tiom kapabl— . . . ke li ekintenc— devig— si— plijun— frat— por serv— (dat hij het plan opvatte zijn jongeren broeder te dwingen om te dienen).
8. Kaj kiam tiu ĉi denove pet— al li depren— la frukt—, li respond—: „Vid— mi— brak—”.
9. „Ĉu vi ne dir—, ke la viaj ne ating— ĝis la granat—?”
10. „Serv— min, por ke mi ne mangeg— vin”.
11. De tiam serv— la plijun— frat— la malplijun—.
12. Sed li ne ĝoj— pri la malkovr— (ontdekking), kiun li ŝuld— al la leon—.
13. Kaj tiel rest— ĝis la nun— tag—.



Invulling der onvolledige woorden en de lijdende voorwerpen van opgave 18.

1. Bonan tagon; vidis; vin. Ĝojas; revidi; vin; scias; renkontis; vin.
2. Renkontis; min; estis, vojaĝoj. Memoras; plaĉis.
3. Estis; estis; estas; lernis; ion. Komencas; viajn travivaĵojn.
4. Malfermis; kongreson, lian perfekte elparolitan francan lingvon; povis; sekvi; fieris. Restis.
5. Montriĝis; naskis; multajn miskomprenojn. Povis; eviti; tion.
6. Estis; povis; sekvi; diskutojn; scias; tiujn lingvojn; akriĝis; regis; okazis; atakis; montriĝis, indis; torenton; dediĉitan; anglan idiotismon; kiun; komprenis. Memoris; nian interparoladon.
7. Komencis; kompreni; bezonas; internacian lingvon. Konvinkigis.
8. Kaptis; okazon; lerni; Esperanton; komencis; mian rakonton; estas; lerni; ion. Povos; kompari; multlingvecan kongreson, uzas; Esperanton.

Men vraagt ons:

Moet *rifugi* in L.P., blz. 83 eigenlijk niet zijn *fugi*? P. V. raadt af *rifugi* in de zin van *fugi* te gebruiken.

In deze zin kan zowel *fugi* als *rifugi* gebruikt worden: *fugi* = vluchten; *rifugi* = vluchten en tevens een schuilplaats zoeken. En dit kan immers ook in bedoelde zin (*sur la ligna barilo la kato trovis sendanĝeran rifugejon*)?

Wat er aan haperde

Fouten van examen-candidaten.

G. P. de Bruin.

We hebben deze maand de volgende examen-zinnen ter behandeling:

Gisteren ontving ik een brief uit Engeland. Na hem geopend te hebben, zag ik, dat hij van mijn broer was.

Hoe vaker gij u oefent, hoe beter gij Esperanto leert spreken. Het is noodzakelijk, dat gij alles met aandacht leest.

Deze zinnen werden door candidaat H. als volgt vertaald:

Hieraŭ mi ricev¹⁾is leteron el Anglo²⁾. Post malfermiĝinte³⁾ ĝin, mi vidis, ke ĝi estis⁴⁾ de mian⁵⁾ fraton⁵⁾.

Ju pli ofte vi eksercas⁶⁾ vin, ju⁷⁾ pli bone vi lernas paroli Esperanton⁸⁾.

Ĝi⁹⁾ estas necesa¹⁰⁾, ke vi ĉio¹¹⁾ kun atento¹²⁾ legas¹³⁾.

In deze vertaling zijn de volgende onjuistheden aan te wijzen:

1) Dit woord wordt door beginners vaak verkeerd geschreven. Men prente zich de juiste schrijfwijze goed in het geheugen: *ricevis*.

2) Anglo = *engelsman*. Engeland = *Anglio, Anglujo* of *Angllando*.

3) *Na hem geopend te hebben* is een z.g. beknopte bijzin. Deze vervangt de gewone bijzin: *nadat ik hem geopend had*. Wanneer de handeling, die de beknopte bijzin vermeldt, aan de handeling in de hoofdzin genoemd, is vooraf gegaan, dan gebruikt men in Esperanto de deelwoordsvorm *inte*. *Na hem geopend te hebben* = *malferminte ĝin*. Vindt de handeling in de beknopte bijzin en in de hoofdzin gelijktijdig plaats, dan gebruikt men *-ante*. *Malfermante ĝin, mi vidis, ke la letero estas de mia frato*. Dat wil zeggen, dat hij *tijdens het open maken* zag, dat de brief van zijn broer was. Moest de handeling in de beknopte bijzin nog plaats vinden, toen die in de hoofdzin genoemd reeds plaats vond, dan gebruikt men *-onte*. *Malfermante ĝin, mi jam pensis, ke ĝi estas de mia frato*.

In Esperanto (en logisch ook in het Nederlands) moet het (verzwegen) onderwerp van de beknopte bijzin en van de hoofdzin hetzelfde zijn.

Op dezelfde wijze kan in beknopte bijzinnen ook de lijdende deelwoordsvorm gebruikt worden. Deze komt echter niet zo vaak voor. (Dit onderwerp wordt meer uitvoerig behandeld in „Tra la Labirinto”, blz. 110 e.v.)

4) Wat zag ik? Ik zag: hij *is* van mijn broer. Daarom ook: *ke ĝi estas de mia frato*. Nog enige voorbeelden:

Ik dacht, dat hij ziek was = *Mi pensis, ke li estas malsana*.

Hij meende, dat het al acht uur was = *Li opiniis, ke jam estas la oka*.

5) *De* is een voorzetsel, dus: *de mia frato*, zonder *n*!

6) *Eksercas*!

7) In Esperanto zegt men: *ju des* Hier dus: *des pli bone*.

8) Of: *Esperante*.

9) Het onbepaald voornaamwoord *het* wordt hier niet vertaald.

10) In de Nederlandse zin: *Het is nodig*, is *nodig* een bijvoeglijk naamwoord. Maar in de Esperanto-zin is het een bijwoord; het zegt iets van het *met aandacht lezen*, namelijk, dat dit nodig is. Voorbeeld:

Het is goed, dat ge gekomen zijt = *Estas bone, ke vi venis.*

Het is aanbevelenswaardig = *Estas rekomendinde frue leviĝi.*
vroeg op te staan

Het is jammer, dat ge dit niet = *Estas domaĝe, ke vi ne diris ĉi*
eerder gezegd hebt *tion pli frue.*

11) Bepaling zonder voorzetsel, dus *ĉion!*

12) Ook wel: *atente*.

13) Moet zijn: *legu*. Hier wordt toch een noodzakelijkheid uitgedrukt, en dan gebruikt men de aanvoegende wijs. Betere volgorde: *ke vi legu ĉion kun atento.*



Opgave 27. Vertaal in het Esperanto:

1. Toen ik vernam wat hem was overkomen, was het reeds te laat om nog naar hem toe te gaan. 2. Mijn oom heeft me gisteren bezocht; hij had gehoord, dat ik spoedig op reis zou gaan. 3. Het is (wel) gewenst, dat ge de cursus geregeld bezoekt. 4. Nadat we gegeten hadden, gingen we direct aan het werk. 5. Met genoegen zullen we aan uw verzoek voldoen. 6. Hij vertelde ons, dat hij de volgende week naar Parijs ging. 7. Hoe meer ge studeert, des te beter zult ge deze zinnen kunnen vertalen. 8. Het is onbegrijpelijk, dat men dit voorstel niet heeft aangenomen. 9. Terwijl hij dat zei, keek hij ons vragend aan. 10. Na gewassen en gekleed te zijn, liep de kleine jongen haastig de straat op, om zijn speelgenootjes te zoeken.



Vertaling van opgave 19.

1. Kion ajn li rakontas, ĝi estas malofte io nova. 2. En la jaro milnaŭcent-kvardek-oka finiĝis la okdekjara milito. 3. La knabo ploris pro kolero. 4. Ni vizitis en Svisio ĉiujn lokojn (urbojn), kie ankaŭ li estis. 5. Ĉi tiu malĝojiga sciigo (komuniko) tre konsternis nin. 6. La forno brulas malbone; la akvo ankoraŭ ne bolas. 7. La fajro estingiĝis. 8. Ŝi povas (scias) bonege kalkuli. 9. Ĉi tiu maŝino adicias, subtrahas, dividas kaj multiplikas. 10. Ni iris duope al la teatro (Ni estis duope en la teatro).

Men vraagt ons:

In het woordenboek van Van Straaten komt als vertaling voor *zoutevis*: *laberdano* voor, welk woord in P. V. niet te vinden is. Is deze vertaling aan te bevelen?

Daar er voor de naam *zoutevis* blijkbaar geen andere vertaling in gebruik is, kunnen we hiervoor *laberdano* wel aanbevelen. In het Esp.-tsjechisch woordenboek van Čanski en Riedl treffen we naast *laberdano* ook *labardano* aan. De naam is van franse herkomst (van *Le Labourd* in Bayonne). In het nederl. ook wel *labberdaan* of *abberdaan*.

Handleiding bij het vertalen.

F. Faulhaber.

Tekeningen van Svitberto.

De invloed van onze moedertaal (vervolg).

Daarom is de naam „directe methode” voor die manier van taalonderwijs, waarop men de vreemde taal *rechtstreeks*, d.w.z. zonder behulp van zijn moedertaal, leert, eigenlijk onjuist. De voorstanders van deze methode gaan uit van het feit, dat een kind, dat „op moeders schoot” zijn taal leert, dit ook niet via een andere taal doet.

Hoe aannemelijk deze redenering ook klinkt, zij gaat evenwel mank, want een kind, dat zijn moedertaal leert, kent nog geen andere taal: zijn „lei” is nog onbeschreven. Daarentegen kent iemand, die een vreemde taal gaat leren, reeds zijn eigen taal, die op zijn lei al diepe krassen heeft gemaakt, die nog lange tijd door de nieuwe taal heen zichtbaar zullen zijn. Niet te verwonderen is het dus, dat een leider van een directe-methode-cursus op zijn vraag: *Kio estas blua?* van de grootste helft zijner leerlingen ten antwoord kreeg: *La aero estas blua*, in plaats van: *La ĉielo estas blua* (de lucht is blauw). Aldus een voorbeeld uit de praktijk, dat met vele andere te vermeerderen is en waaruit blijkt, dat men, ondanks het „rechtstreekse” van de methode, bewust of onbewust, tóch vertaalt.

Hoe aan die invloed van onze eigen taal te ontkomen? Het is duidelijk, dat het wekelijks bijwonen van een Esperanto-cursus en het min of meer sporadisch beoefenen van de taal niet opweegt tegen het voortdurend gebruik van onze moedertaal, dagelijks van 's morgens tot 's nachts, van onze prille jeugd af! Willen we Esperanto even vlot kunnen hanteren als het Nederlands, dan zal het een grotere plaats in ons leven moeten innemen, dan tot nu toe het geval was. Dan moeten we de invloed van onze moedertaal tegengaan door meer invloed aan Esperanto te geven. Dit kunnen we, door Esperanto méér te beoefenen dan we tot dusverre deden, in de eerste plaats door véél meer te *lezen*. Door veel lezen van goede schrijvers, maken wij ons de uitdrukkingswijze van de taal eigen. Die uitdrukkingswijze verschilt in menig opzicht van die van het Nederlands. Zij vloeit voort uit de eigen denkwijze van Esperanto, een denkwijze, die gebaseerd is op de logica. Wij moeten dus de min of meer chaotische conventionele en nationale manier van denken van het Nederlands veranderen in de logische, wèl-doordachte en internationale denkwijze van het Esperanto.

„Als we vertalen, dan moeten we de te vertalen tekst altijd *óverdenken* (opnieuw denken) in Esperanto. Doen we dat niet, is onze vertaling slechts de woordelijke veresperantisering van het oorspronkelijke, dan wordt ze internationaal onbegrijpelijk.”

Aldus Prof. Cart in zijn „Vortoj”.

En Dr. Zamenhof schrijft in zijn „Letero pri la deveno de Esperanto”, dat, toen hij woordelijke vertalingen begon te vermijden en trachtte rechtstreeks in Esperanto te denken, de taal ophield een vage schaduw te zijn van de taal, waarmee hij bezig was, en een eigen geest, een eigen leven en een eigen karakter kreeg, niet meer afhankelijk van zekere invloeden.

Wij moeten trachten ons van de Nederlandse taal los te maken en — zoals Prof. Cart het zo juist zegt — de te vertalen tekst *óverdenken* in Esperanto. Dan zullen we geen vertaald Nederlands meer

schrijven, maar in Esperanto weergeven, hetgeen bij het lezen en *over-denken* ons geestesoog ziet gebeuren.

Dit is niet gemakkelijk en algehele volmaaktheid zullen we wel nimmer bereiken, maar we moeten toch nooit ophouden, er naar te streven.

Esperanto en la ĉiutaga vivo.

H. Velthove.

M.: Zo! Nu even een gulden *in* de meter *doen* en eens kijken, of het toestel *het* nu *doen wil*. *Het kinderkoor is* natuurlijk al *afgelopen*.

Ah. *Ze draaien plaatjes*. Nou, een vrolijke mop *kunnen we best hebben*. 't *Is* toch al saai genoeg *op Maandag*, zo niemand om *je heen*. Allemaal natuurlijk aan de was. Geen mens die *even aan komt wippen*. Hè, je man *moest* nu dichter bij werken; dan kon ie 's middags thuis komen *met eten*. Dat *breekt de dag*.

Kom, laat ik m'n brood verder opeten. Door dat geklets met die melkboer is m'n koffie ook al koud geworden....

Als ik gauw de aardappels *schil*, en de andijvie schoon maak, *kon ik eigenlijk best nog wel even* op de fiets springen en naar moeder gaan.... ja, dat doe ik.

Agent: Stoppen!

M.: Wat *zullen we nu krijgen?*

Bel.-ambtenaar: *Uw plaatje?*

M.: Oh jé, *dat heb ik thuis laten liggen*.

Bel.-ambtenaar: Dat spijt me, *maar ik zal uw fiets in beslag moeten nemen*.

M.: Maar ik heb mijn belasting toch betaald! Ik heb het plaatje vergeten mee te nemen. Ik *zal het wel even halen*. Ik woon hier vlakbij.

Nu. Mi nun *metu* la guldenon en la registrilon kaj mi vidu, ĉu la radio-aparato nun *funkcias*. *La vico de la infanhoro* kompreneble jam *pasis*.

Ha, oni *ludigas gramofondiskojn*. Nu, gajiga melodio certe *plaĉas (konvenas) al mi*. *Lundo ja estas* sufiĉe *monotona tago*, pro *nenies ĉeesto*. Kompreneble ĉiu lavas tolaĵon, kaj neniu *venas vizite por kelke da momentoj*. He, *mi dezirus*, ke la (mia) edzo laboru pli proksime (de la hejmo); tiukaze li tagmeze povus veni hejmen *por manĝi*. Tio *agrabla interrompus la longan tagon*.

Nu, *mi daŭrigu mian matenmanĝon*. Pro la babilado kun la laktisto mia kafe malvarmiĝis..

Se mi rapide *senŝeligos* la terpomojn kaj purigos (lavos) la endivion, *ankoraŭ estos la eblo (ankoraŭ eblos al mi) salti sur la biciklon kaj iri al la patrino*... Nu, mi faros (tion).

Haltu!

Kio nun okazos al mi?

Kie estas via impostmarko?

Ho, (mi forgesis), mi *lasis ĝin hejme*.

Mi bedaŭras. Tamen vian biciklon mi *devas konfiski*.

Sed mi ja pagis la imposton! Mi forgesis nur kunpreni la markon. Mi *reiros por preni ĝin*. Mi loĝas *tuj apude*.

Esperanto 50-jara.

Disciplino.

Libero en pensoj, paroloj, labor',
Por homo prudenta ŝatinda trezor'.
Sed same necese por venki en fin',
La hom' sin ekzercu en memdisciplin'!

La artefariteco de Esperanto eble ne tiom krude esprimiĝas en la lingvo mem, kiom en la esperantistoj. Se Esperanto estus lingvo parolata de speciala gento, al neniu el tiuj gentanoj la ideo venus en la kapon arbitre uzi la lingvon laŭ propraj gustoj, sed oni aplikus ĝin, obeante ĝiajn regulojn. Esperanto, tamen, havas la malbonŝancon esti uzata — ho ironio! — ne de esperantianoj, sed de esperantistoj, el kiuj multaj kredas havi la rajton personaguste manipuli la lingvon, ne sentante sin ligitaj de ia morala disciplino.

La perfido de De Beaufront estis kaŭzinta konsternon kaj ian seniluziigon en la rondo de l'fidelaj esperantistoj. Ili komprenis, ke usĝas gardi la lingvon kontraŭ eventuale venontaj danĝeroj. La reformproponoj kaj -postuloj estis pruvintaj, ke multaj adeptoj de l'internacia lingvo ne konscias, ke nur per konkordo, unueco kaj disciplino al la komuna ideo ili sukcese disvastigos la lingvon. Tiu ĉi perfido instruis al la esperantistoj, ke komuna afero povas venki nur, se ĝiaj propagandantoj discipline rezignas personajn preferojn.

Inter la voĉoj vokantaj al disciplino laŭte aŭdiĝis la simpatiaj paroloj de prof. Th. Cart, kiu konstante kaj energie admonis kontraŭ ĉiu eĉ eta ŝanĝo en la lingvo. „Nia lingvo vivas”, diris Cart. „Sed tial, ke ĝi vivas, ĝin oni ne rajtas konsideri kiel ian maŝinon, kies diversaj pecoj kaj partoj estas laŭvole ŝanĝeblaj aŭ forigeblaj.”

En pluraj artikoloj Cart admonis resti fidelaj al la Fundamento kaj discipline obei la decidojn de niaj lingvaj institucioj „Lingva Komitato” kaj „Akademio”. Dum kelke da jaroj oni multe diskutis pri la rolo de tiuj ĉi institucioj, ĉu estas bone, ke ili havas taskon nur kontrolan, aŭ ĉu estas preferinde, ke ilia tasko estu gvida. Multaj esperantistoj preferis, ke la lingvaj institucioj energie gvidu la evoluon de la lingvo, ĉar ili opiniis, ke la movado bezonas fortan

Bel.-ambtenaar: *Nee, daar heb ik niets mee te maken. U kunt me wel zoveel vertellen.*

M.: *Nah, een mooie boel met die belasting. Nou heb je betaald en nemen ze je karretje nog af.*

Bel.-ambtenaar: *Sputtert u nu maar niet tegen. Hier hebt u een bewijsje. Hierop kunt u, na betaling van de boete aan het belastingkantoor in de Fiscusstraat, vanavond tussen 6 en 8 uur uw fiets terug krijgen.*

Ne, ĉi ĉio (viaj asertoj) estas indiferenta(j) al mi.

Pri ĉi ĉio mi ne okupas min. Vi povas diri, kion vi volas — mi ja ne bezonas kredi tion!

Nu, bela sistemo, la enkasigado de l'imposto. Mi jam pagis ĝin kaj malgraŭe oni konfiskas mian veturilon.

Vi ne grumblu al mi. (Vi ne kontraŭstaru.) Jen estas bileto. Post pago de la punmono en la impostoficejo ĉe Fiskostrato, hodiaŭvespere inter la 6a kaj 8a (horo), vi povos rricevi (rehavigi al vi) per ĝi vian biciklon.

disciplinon. Tamen, eble ĝuste ili eraris! La esperantista anaro ne estas armeo. Truditaj disciplinon ĝi eble ne akceptus. Preferinda estas libervole akceptita disciplino kiu esence konsistas en mem-disciplino: por la bono de l'komuna afero regi aŭ subpremi la individuajn dezirojn, kiom ili devias da l'komuna intereso.

Eble ni ŝuldas precipe al sro. Cart. ke la danĝero, ke Esperanto pereus pro interna malkonkordo de siaj adeptoj, pli kaj pli malgrandiĝis. Sed flanke de tio ni devas akcenti, ke Esperanto jam tiam posedis en si mem forton rezistantan kontraŭ detruaj influoj, nome sian literaturon. Kaj ju pli forte malvolviĝas tiu ĉi kerno, des pli fortika ĝi montriĝos kontraŭ eventualaj atakoj. Tiun fakton sendube komprenis la literaturistoj en nia movado, ĉar en tiu tempo ili dediĉis grandan zorgon al la literaturo. Aperis diversaj verkoj, kiuj konservis eĉ ĝis nun sian valoron. La admonoj de Cart ne estis senefikaj. Kvazaŭ konkure la literaturistoj klopodis verki kaj traduki kiom eble plej fidele laŭ la Fundamento.

Kiel modeloj de simpla laŭfundamenta stilo el tiuj jaroj precipe reliefigis unuavice la paroloj de Cart mem, zorge elektitaj kaj en 1927a libroforme eldonitaj, plie la originalaj romanoj de Luyken, „Paŭlo Debenham” kaj „Mirinda Amo” kaj „Travivaĵoj de Ro Ŝo”, aŭtobiografio de Richard Sharpe, la „ĝisosta” fundamentulo.

Iasence, tamen, la propravole akceptita disciplino havis efikon iom riproĉindan, efikon, kiu ankoraŭ nuntempe grave influas la evoluon de la literatura lingvo. Kelkaj aŭtoroj, nome, pli multe zorgis pri la stilo ol pri la gramatika flanko de siaj verkoj. Imitante formojn uzitajn de Zamenhof mem, ili ne distingis inter logike defendeblaj kaj kontraŭlogikaj formoj. Imitado estas bona, kondiĉe ke ĝi okazu konscie, ne sklave. En sia fervoro, apliki la lingvon kiom eble plej fidele laŭ la modelo de Zamenhof, kelkaj verkistoj same disvastigis la nekonsekvence kaj neĝuste uzitajn formojn de la Majstro, kiel tiujn laŭregule formitajn. Ofte faritaj kaj nekonscie aŭ senpripense transprenitaj eraroj estas ekzemple kontraŭregula vortkonstruo (*deflankiĝo, enradikiĝi, elradikiĝi, centjaro, kokviro* k.a.), troa uzado de kelkaj afiksoj (*ek, ad, em, ec*), neĝusta aplikado de kelkaj prepozicioj, precipe la dusenca uzado de *po*, neklara distingo inter transitivaj kaj netransitivaj verboj, nekonsekvenca aplikado de l'direkta akuzativo k.t.p.

Sed la esperantista popolo, tiutempa facile glutis tiujn ĉi erarojn. La aperon de ĉiu nova libro oni aplaudis, ne sufiĉe konsiderante ĝian kvaliton. Pardonebla eraro! Almenaŭ por tiu tempo! Eĉ la unua originala romano en Esperanto, kompreneble kun ĝenerala ĝojo akceptata, „Kastelo de Prelongo” (1907a) de Valienne, estas laŭ lingva vidpunkto tre kritikinda, same kiel ties dua romano, „Ĉu li?” Sed oni konsideru, ke Esperanto estis tiam en sia junaĝo kaj ke la tiamaj esperantistoj bezonis nutri sin per entuziasmo pli ol per serioza rezonado pri la scienca flanko de la lingvo! Erarojn el entuziasmo faritajn oni facile pardonas; nepardonebla, tamen, estas la eraro nuntempa: imiti tiajn lingvajn makulojn!

Men vraagt ons:

Moet men in „Tridek jarojn en la ora nordo” op blz. 197 in plaats van *kaj satigas sin per ŝia lakto* niet lezen: *kaj satigas ilin per sia lakto*.

Neen; het onderwerp van *satigi* is niet *ŝi* (dan zou uw veronderstelling juist zijn), maar het woord *plenkreskuloj*.

Por Progresantoj.

Opgave 28. Vertaal in het Esperanto:

Nog iets nodig, mijnheer?

(Slot.)

De ambtenaar haalde z'n schouders op, lachte vriendelijk, en zei dan: „Mijnheer, u bent tegen u zelf. Maar als u beslist niets anders wilt hebben, mijnheer Stiphout, dan is er niets aan te doen. Misschien een andere keer. Hier zijn de twee postzegels van vijf cent, en als u weer eens wat nodig heeft, hoop ik, dat u om me denkt. Misschien wilt u een spaarbankboekje aanvragen? Tweede loket in de hoek, en.... Dag, mijnheer, groeten aan uw vrouw en kinderen en uw hele familie. Goede zaken, mijnheer!” schreeuwde de ambtenaar hem nog achterna. Maar de woedende „klant” was als een haas verdwenen.

Verbaasd hadden alle aanwezigen naar dit vreemde gesprek geluisterd, en ik vergat van stomme verwondering te zeggen, wat ik wilde hebben.

„Wat heeft dat te betekenen? Waarom deed je zo dwaas?” informeerde 'n collega van den ambtenaar.

Met een vergenoegd gezicht haalde hij diep adem en zei dan: „Uit wraak, en nergens anders om.”

„Uit wraak?” herhaalden de andere ongelovig. „Wat heeft die man je dan gedaan?”

De ambtenaar zuchtte, en zei dan: „Die kerel, die Stiphout is mijn barbier. Ik laat me elke dag bij hem scheren, en steeds weer laat hij me niet opstaan, voordat hij mij zijn hele voorraad parfums, haarwater, zeep, scheermesjes en andere toiletbenodigdheden heeft aangeboden....”



Vertaling van opgave 20.

Cu vi bezonas ankoraŭ¹⁾ ion, sinjoro?

Ĝi²⁾ okazis antaŭ tri tagoj en la filia³⁾ poŝtoŝticejo de la okcidenta kvartalo⁴⁾. La ĝiĉetoj estis ĵus⁵⁾ malfermitaj kaj da homoj ne jam estis multe⁶⁾. Kvinkelke⁷⁾ da homoj iris atende⁸⁾, skribis starante, plenigis sian fontplum(ing)on⁹⁾ aŭ igis pesi¹⁰⁾ leteron.

Kun faciligita¹¹⁾ koro mi paŝis al la ĝiĉeto: Poŝtmarkoj¹²⁾. Ne okazas (ja) ĉiutage¹³⁾, ke oni estas tuj servota¹⁴⁾; ordinare¹⁵⁾ oni devas atendi minimume¹⁶⁾ dudek minutojn.

Mi do ne tre¹⁷⁾ rapidis, kaj tio kaŭzis¹⁸⁾, ke ĝuste¹⁹⁾ antaŭ mi alia²⁰⁾ sinjoro sin ŝovis²¹⁾ preter la barilon kaj do antaŭis²²⁾ min. Nu²³⁾, tio ne tre ĝenis²⁴⁾ min. Se estas kutimo²⁵⁾, ke oni regule²⁶⁾ devas atendi dudek minutojn²⁷⁾ tri aŭ kvin minutoj ne ludas rolon.

„Mi petas²⁸⁾ du poŝtmarkojn po²⁹⁾ kvin (cendoj),” diris la sinjoro abrupte.

La ofiĉisto kapjesis³⁰⁾, deŝiris du poŝtmarkojn de la granda folio el la libro kaj ekrigardis la „klienton”.

„Ha³¹⁾, ĉu mi ne eraras³²⁾?” li demandis, afable ridetante.

„Kion vi aludas³³⁾?” demandis la sinjoro mirigita.

„Ĉu mi havas la honoron paroli kun³⁴⁾ sinjoro Stiphout?”

„Jes, mi estas....”

La oficisto kapsalutis³⁵) ĝoje kaj demandis plu³⁶): „Kiel vi fartas, sinjoro Stiphout? Kaj kiel fartas via edzino³⁷), ĉu hejme ĉio estas bona³⁸)? Ĉu viaj infanoj ankoraŭ estas tiom malfacilaj³⁹)? Kaj kiel statas⁴⁰) viaj negocoj⁴¹)?”

„Dankon, bone,” respondis la alparolito.

Mi esperas, ke la vetero restos⁴²) bona, se ne⁴³), la (piedpilka) konkurso Nederlanda-Germania⁴⁴) fiaskos⁴⁵). Ĉu vi intencas iri tien⁴⁶).”

La „kliento” fariĝis malpacienca⁴⁷) kaj diris:

„Ne, mi ne havos⁴⁸) tempon. Sed, mi petas⁴⁹), ĉu mi nun povas ricevi la du poŝtmarkojn po kvin?”

„Kompreneble, sinjoro, kun plezuro, sinjoro”, diris la oficisto, ne donante tamen⁵⁰) la (poŝt)markojn, kvankam la kliento urĝe⁵¹) alŝovis la dekonguldenon⁵²) en lia direkto⁵³).

1) Wel logisch, maar minder mooi is: *plian bezonajon*.

2) Gi mag niet worden weggelaten; de zin zou dan betekenen: *er gebeurde*. La jeno kan ook.

3) Of: *helpa*. Toevoeging van *situanta* is overbodig.

4) Of: *en*. Ook: *kvartalo „Okcidento”*. Niet: *projektita okcidenten*.

5) Niet: *jus estis*; *jus* slaat op *malfermitaj*.

6) Of: *ankoraŭ ne estis multo por fari*. Ook: *ne estis movoplene*. Niet: *homplena*; de zin is dan immers onpersoonlijk.

7) Ook: *kvinkalkaj* of: *proksimume kvin*. Ook wordt *ĉirkaŭ* nog wel gebruikt. Niet: *kelkkvino*, wat zou betekenen *enkele vijftallen*.

8) Niet: *iris sencele, tien kaj ree, jen kaj jen, de unu flanko al alia*, noch: *ĉirkaŭiris*. Al deze vormen geven de betekenis niet weer.

9) Niet: *plumsorbilo*.

10) Of: *pesigis*. Niet: *lasis pesi*. Ook niet: *pezigis* = zwaar maken.

11) Ook: *malpeziginta*. *Sensargigita* is te sterk. *Facila* geeft de betekenis niet weer. *Facilanime* heeft een meer morele betekenis.

12) Of: *Vendo de...*

13) Ook: *ne ĉiutage oni bonŝancas per tuja serviĝo*.

14) Niet: *senplis* = zonder meer. Niet: *oni tuj helpas vin*. In het nederlands zegt men wel *je*, maar de betekenis is *oni*. *Helpi* kan ook. *Helpata* of *servata* is minder juist.

15) Ook: *plej ofte* of: *preskaŭ ĉiam*.

16) Ook: *almenaŭ*.

17) Goed zijn ook wel: *speciale, aparte, eksterordinare*.

18) Ook: *tiel estis eble*, maar dan volgt daarop *ŝovas*, omdat de zin met *ŝovi* dan onderwerpszin wordt, die in de directe rede gezet kan worden. Ook: *tio estis la kaŭzo*. *Tiel okazis* kan ook.

19) Niet: *jus* = zoëven.

20) Niet: *ia* = een zekere heer, een zeker soort.

21) Ook: *preterpasis la barilon*. *Krado* = tralie. *Antaŭ mia nazo* is wel te gebruiken.

22) Logisch, maar minder mooi is: *estis pli frue ol mi*.

23) Toevoeging van *jes* is te nederlands.

24) Ook: *tre grava tio ne estis*. Minder goed: *mi ne bedaŭris tion*.

25) Ook: *se oni kutimas*. Niet: *kutimiĝas* = gewoon raken.

26) Ook: *ofte*.

27) Ook: *perdo de...* Ook: *ne gravas*.

28) Ook wel: *ĉu vi havas por mi* of: *ĉu mi povas ricevi*.

29) Ook: *kvincendajn*. Te gebruiken is ook: *de kvin*.

30) Ook: *kapmovis*.

31) *Hola* kan ook wel, maar lijkt ons hier niet op de juiste plaats.

32) *Ne* is hierbij nodig, omdat de ambtenaar meent, dat hij zich NIET vergist.

33) Ook wel: *pri kio vi parolas*, of: *kion vi celas*.

34) De Esp.-zinsbouw staat niet toe de zin, als in het nederlands, af te breken, omdat in Esp. de naam St. achteraan staat en niet verzwegen mag worden. Ook: *al*.

35) Ook: *kapklinis*.

36) Niet: *tiam*, noch: *poste*, omdat er sprake is van een voortgaan met de handeling spreken, niet van een opeenvolging van handelingen.

- 37) Niet: *kia estas*.
- 38) Ook: *ĉio bonorda hejme*. Ook wel: *marŝas bone*.
- 39) *Tiom* is hier beter dan *tre*, omdat bedoeld zal zijn: *tiom, kiom ili ĝis nun estis*. Ook: *ĝenaj*, maar niet: *ĝenantaj*.
- 40) Ook: *iras, marŝas* of: *prosperas laŭdezire*.
- 41) Niet: *komerco* = groothandel, of: *negocaĵo* — handelswaar; ook niet: *aferoj*.
- 42) Na *esperi* gebruike men geen aanvoegende wijs. Niet: *daŭrigi* = voortgaan met iets. Wel kan: *daŭras esti*.
- 43) Niet: *alie*. Wel kan: *tiuokaze.. ne*. Na *se ne* mag de komma niet vergeten worden; de zin zou daardoor een geheel andere betekenis krijgen.
- 44) Ook wel *Nederlando-Germanio*. Niet: *Hol(l)ando*, waarmee slechts twee provinciën bedoeld worden.
- 45) Ook: *malsukcesos*; niet: *fiaskigos*. *Fiaski* is onovergankelijk.
- 46) Minder goed is: *ĉeestos ĝin*.
- 47) Ook: *senpacienciĝis* of: *malpacienciĝis*.
- 48) Niet: *havas*; er is van iets in de toekomst sprake.
- 49) Minder goed: *ĉu vi permesas, ke mi ricevu*. Na *permesi* gebruike men de aanvoegende wijs. Men zegge ook niet: *estas permesate*, maar: *permesite*.
- 50) Ook: *sed li ne elmanigis* of: *transdonis*.
- 51) Ook: *rapide*; niet: *rapidece*. De uitgangen *-ece* en *-eca* zijn logisch niet te verdedigen. Niet: *vigle* = levendig.
- 52) Niet: *dekcendon*; wel: *dekcendan moneron*.
- 53) Het woord *direkto* kan nooit de richtings-n krijgen. De richting is geen plaats, waarheen iets gaat, maar een denkbeeldige lijn, waarlangs iets gaat.

Kun ruĝa krajono tra la literaturo. XXIV.

Th. Buis.

Ĉapitro IV.

REDIRI - RESPONDI - REKOMENCI - DAŬRIGI k. a.

1. *Nun* (d. e. *nu*) *rediris* (d. e. *daŭrigis*) *la alia, vi tamen estus iam eksciinta tion*.
2. *Mi ne konas ilin pli detale, rediris* (d. e. *respondis*) *la pastro*.
3. *Tio egalas la aŭtoritaton de...., respondis* (d. e. *diris* aŭ *asertis*) *sinjoro A*.
4. *Tamen mi fidas, rediris* (d. e. *diris, rekomencis* aŭ *obstinis*) *la pastro*.

Citante interparolon verkanto povas enkonduki unu el la partoprenantoj parolanta kaj karakterizi per ia verbo la frazon diratan de tiu parolanto. Tamen, la elekto de la karakteriza verbo ne dependas de la arbitro de la citanto, sed de la maniero, laŭ kiu la parolata kaj karakterizata frazo rilatas al la frazo dirita de la antaŭa parolanto. Se tiu frazo estas demando, la frazo de la enkondukata parolanto povas esti respondo, neo, konfirmo aŭ ignoro. La citanto do diru: „....” *respondis, neis, konfirmis* aŭ *ignoris li aŭ ŝi*. Se la citata frazo estas daŭrigo de temo antaŭe interrompita de la sama parolanto, la citanto diru: „....” *daŭrigis li aŭ ŝi*. Se la citata frazo tute ne rilatas al la frazo dirita de la antaŭa parolanto, nek al la temo antaŭe traktita de la enkondukata parolanto mem, la citanto diru: „....” *diris li aŭ ŝi*. Ĉar la enkondukata parolanto ĉiam ion *diras*, oni povus ŝanĝi ĉi tiujn formojn en: *diris nee, jese, konfirme, daŭrige k.t.p.* Oni tamen memoru, ke nur la karakterizo de la rilato inter la antaŭa frazo, ĉu de la antaŭa parolanto aŭ de la enkondukata parolanto mem, estas decida faktoro en la elekto de la karakteriza verbo. Obeas neniu el la kvar ĉi supre menciitaj frazoj kritikataj al ĉi tiu logika, do simpla postulo.

ECO - AĴO.

1. *La perfekta harmonio estis unu el la veraĵ belecoj* (d. e. *belaj ecoj* aŭ *belaj ecoj*).
2. *Neniu intimeco* (d. e. *intimaĵo*) *estis pensebla* (d. e. *imagebla*), *ĉio restis formala, majesta, grava* (d. e. *serioza*).
3. *Liaj malgrandaj malforteco* (d. e. *malfortaĵoj* aŭ *malfortaj ecoj*).

La tradukinto evidente ne klare komprenas la celon de la sufiksoj *aj'* kaj *eo'*, do ne sentas diferencon inter abstraktaj kaj konkretaj ideoj. Ĉi tiu nescio estas facile pardonebla al nederlandanoj, ĉar ĉi tiu diferenco neniel manifestiĝas en la nederlanda lingvo, do la sento, la distinga povo de nederlandanoj por tiu

diferenco, tute ne disvolviĝis. Tial ni, nederlandaj esperantistoj, bezonas kriterion, devante elekti unu el la du sufiksoj por traduki unu el niaj ambaŭ-sencaj vortoj nederlandaj, laŭ ĝia ĝusta senco, en Esperanton. Mi klare memoras, kiel mi mem, antaŭ pr. 32 jaroj, lernante Esperanton, koliziis kun ĉi tiu malfacilaĵo. Streĉinte mian cerbon ĝis ekstrema eblo, mi komprenis perfekte neniom pri ĉi tiu al mi enigma regulo; mi jam ekdubis la eblon povi lerni Esperanton kaj mia entuziasmo konsiderinde reduktiĝis. Jen aperis lernolibro por laboristoj, populare verkita de la pioniro por Esperanto en Nederlando, Dreves Uitterdijk. En ĝi mi legis pri la sufiksoj *ec'* kaj *aj'*: „*ajo* = io, *belaĵo* = bela io; la sola diferenco inter *ajo* kaj *io* estas: *ajo* estas sufikso kaj *io* estas ordinara substantivo. *Ajo* ligita kun adjektiva ideo signifas: io, kio posedas aŭ havas en si la proprecon esprimatan per tiu adjektivo”. Jam ekkrepuskis en la densa mallumo!” „*Eco*”, li daŭrigis, „indikas ne la posedon de la adjektiva ideo, sed la adjektivan ideon mem kiel substantivon; ĝi konsistigas la nomon de la adjektiva ideo, ĝi substantivigas ĝin, ĉar *eco* = propreco”. Sekvis kelkaj klarigaj ekzemploj: „Tiu sinjoro estas fama pro sia riĉeco, li posedas multajn riĉaĵojn. La alteco de tiu altaĵo estas impona”. Hela lumo subite anstataŭis la krepuskon, kaj mi klare sentis la diferencan inter *ajo* kaj *eco*. Timante perdi la ĵus akiritan scion, mi tuj penis ellabori al mi kriterion, per kiu mi povu orientiĝi en dubaj okazoj; ĉar, leganto, inter teoria scio kaj praktika posedo ofte kuŝas pene irebla vojo. Mi sukcesis ellabori al mi kriterion.

Se adjektiva radiko + *eco* konsistigas la nomon de substantivigita adjektivo — tiel mi rezonis — tiu nomo ampleksas la tutan ideon, do ne povas esti uzata plurale. Multmaniere mi elprovis mian kriterion kaj konkludiĝis, ke ĝi estas ĝusta. Efektive, tiel estas! La abstrakta ideo ne estas pluraligebla. La vorto *propreco* esceptiĝas, ĉar *propria* ne estas adjektivo en la ordinara senco. La sufikso *ec'* estas sinonimo de la vorto *proprec'*. La plurala vorto nederlanda, *huwelijken*, ne estas *geedzeco* en Esperanto, ĉar la vorto *huwelijk* kiel instituto ne havas pluralon. La nederlanda frazo: „Er werden gisteren tien huwelijken voltrokken” estas jene tradukenda: „Hieraŭ dek paroj (da homoj) geedziĝis” aŭ en formo pasiva: „ili estis geedzigataj”. Se vi, leganto, staras antaŭ la problemo, ĉu uzi *aj*, aŭ *ec'*, aŭdigu al vi la pluralon de tiu vorto; se ĝi estas abstrakta, do la nomo de la *eco* mem, via lingvosento protestos senteble kontraŭ la pluralo. Post tia protesto vi apliku la sufikson *aj'*, kaj vi neniam eraros.

VOLI - DEZIRI - DECIDI - DESTINI - DIFINI.

1. *Mi volus* (d. e. *dezirus*), ke mi povus tion (d. e. *povu (fari) tion*, aŭ: *estu kapabla (kapablu) pri tio*).
2. *Sed kion alian vi volas* (d. e. *deziras*).
3. *La potencaj Devaĵoj volis* (d. e. *decidis, destinis aŭ difinis*), ke *estu alie; al ilia certe saĝa decido ni submetiĝu, vi tiel ke mi* (d. e. *vi tiel, kiel mi, aŭ grade: vi tiom, kiom mi, aŭ: vi same kiel aŭ kiom mi*).
4. *Mi volas* (d. e. *deziras*) kiel favoron....

Kvankam en la lingvo nederlanda la vortoj *wensen* = *deziri*, *besluiten*, *beslissen* = *decidi*, *bestemmen* = *destini* kaj *bepalen* = *difini*, oni ofte esprimas tiujn ideojn per la vorto *willen* = *voli*.

En la homo vivas inklino esprimi plej eble multajn diversajn ideojn per unu la sama vorto tiel, ke ĝia senco senĉese varias laŭ la teksto, en kiu ĝi estas uzata. Ĉi tiu kutimo reduktas la kvaliton de la interna karaktero de lingvo, malklarigas ĝin, ĉar la reliefo de la bildoj pro tio perdiĝas kaj la lingvo, kiel tuto, ebeniĝas. Aplikate al ĉiuj elementoj de lingvo, ĉi tiu reduktemo konsistigas la esencon de la diferenco inter lingvoj naciaj unuflanke kaj kompreneble Esperanto aliflanke. Se oni en ĉiuj lingvoj naciaj sammaniere devius de la rekta linio, la stato ne gravus. (Per la rekta linio mi celas diri: ke la prizorgado de la sintakso, la elektado de la vortoj, formoj kaj bildoj estu tia, ke oni povas postuli al ĉiu esperantisto, el kiu ajn lando, ke li komprenu la skribitan tekston.) Sed ne estas tiel. Ĉiu nacio nekonscie devius de ĉi tiu linio en aparta maniero, kiu estas konstatebla nur al alilandanoj; nur malmultaj homoj kapablas konstati la strangecon de esprimformoj en propra lingvo. Inter ĉiuj lingvoj naciaj staru Esperanto kiel normo netuŝebla, t. e. neinfektebla al la suprajemo, kiu ludas gigantan rolon en tiuj lingvoj. La esperantisto distilu el siaj vortoj kaj formoj naciaj nur la sencon kaj serĉu konvenajn vortojn kaj formojn en Esperanto por prezenti tiun sencon komprenebla al la internacia publiko. Li adaptu siajn esprimformojn al Esperanto, (ne inverse!) por ke ni ne ekhavu haoson en kvadrato, ne trafu en labirinton neelireblan.

La vorto *voli* estas transitiva diras P.V. Kiu aŭ pli ĝuste, kio — fiksas la

(ne)transitivecon de verbo? En la lingvoj naciaj la ĉiopova kutimo de la nekompetenta publiko fiksas tion kaj eĉ senkonscie; sed en Esperanto la senco de la verbo difinas tion. La verbo *voli* postulas post si alian verbon, ĝi do estas helpa verbo. Ĝi ne prezentas agon, sed nur animan inklinon, do staton. Ĝi do ne povas esti transitiva. Kiam mi diras: „Mi volas tion”, tiam mi celas diri: „Mi volas *fari* tion”; la *n* de *tion* ne rezultas el *volas*, sed el *fari*, uzita aŭ neuzita. El ĉi tiu evidentiĝas, ke la ideo *voli* ne povas anstataŭi la verbojn *deziri*, *decidi*, *destini* aŭ *difini*.

Men vraagt ons:

Wat betekenen de volgende woorden uit „Tridek jarojn en la ora nordo”: *tajgo* (40-4), *pimplo* (144-1), *sinamon-urso* (146-14), *fretisto* (161-23) en *leadro* (243-3)?

Tajgo = siberisch oerwoud.

Pimplo is uit het frans genomen voor het tsjechische *lumek* = sluipwesp of rupsendoder, Esp.: *ikneŭmono*. De vertaling berust echter op een drukfout in een tsjechisch woordenboek, die door een ander woordenboek weer is overgenomen. Niet *lumek*, maar *lumik* is bedoeld in het boek. *Lumik* is *lemming* (*Lemmus lemmus*), een knaagdier, dat het midden houdt tussen een marmotje en een veldmuis; Esp.: *lemingo*.

Sinamon-urso (misschien is bedoeld: *cinamon*-) is woordelijk uit het tsjechisch overgenomen. Welke berensoort hiermee bedoeld is, konden we in geen boek vinden. In de duitse vertaling van Welzs boek heeft men het dier kortweg maar *Bär* (= beer) genoemd.

Fretisto is een persoon, die van beroep *fretas*; *freti* is, volgens „Komerca Vortaro” van Kreuz-Mazzolini: *ekspedi komercaĵon kontraŭ pago per transporta rimedo*, ekz. *fervojo*, *ŝipo*, *aerplano*. *Fretisto* kan dus o.a. zijn: *vrachtrijder*.

Leadro is eigenlijk geen Esp.-woord; het is uit het engels overgenomen (*leader* = leider, aanvoerder). De schrijver bedoelt ermee de leider-hond, de aanvoerder van de honden, die de slede trekken. Een betere vertaling zou zijn: *gvidhundo* of kortweg: *gvidulo*.

Voor enkele dezer verklaringen hebben we de medewerking ingeroepen van den heel Neuzil in Olomouc, die zo welwillend was ons uitvoerig te antwoorden.

Is het u bekend, dat ook Baghy vaak twee koppelwerkwoorden bijeen gebruikt (*ŝajnas esti* enz.)?

Zeker; de meeste schrijvers vervallen in dit gebruik. Correct is het natuurlijk nooit, maar het komt zo veelvuldig voor, dat men het meestal zelfs niet meer als fout aanrekent.

Is *geld wisselen* niet beter te vertalen door *monerigi* dan door het gebruikelijke *ŝanĝi monon*?

Neen; *monerigi* zou betekenen: *geldstukken maken*. *Ŝanĝi monon* is weliswaar niet volkomen logisch, want het geld blijft immers hetzelfde; toch geeft het de betekenis het beste weer. Iets duidelijker, maar onnodig, zou zijn: *intersanĝi*, want het is immers *ruilen*.

Redakcia korespondo.

Al k-do G. K. en V.: Vi dubas inter la teorio de studolibro kaj la praktiko en la literaturo. Tamen la elekto ne estas tre malfacila: klopodu agi laŭ la teorio kaj elĉektu el la praktiko tion, kio ne efektive kontraŭas la logikon kaj kio ŝajnas al vi vere rekomendinda. La teorio estu nia gvidilo; en la praktiko ni tamen devias, eĉ malgraŭvole. Sed se oni agas nur laŭ la praktiko, oni devias de la teorio ankoraŭ multe pli.

Al k-do N. H. Sch. en H.: Nia klarigo pri *krediti* kaj *debeti* en la antaŭa numero ne estis tute ĝusta. Ni petis al profesiulo klarigon, kiun ni presigos en la proksima numero.

Al k-do A. N. en A.: La temo „neologismoj” estas tro vasta por esti pritraktata en „Men vraagt ons”. Se iel eble ni dediĉos al ĝi ĉefartikolon.